

## **Raporto pri la konferenco kaj la seminario organizitaj de ILEI, DKEA kaj UEA. Kinŝaso, 16-23 de aprilo 2011**

Andrea Bertrand <sup>1</sup> kaj Alain Delmotte <sup>2</sup>

En 2009, por promocii Esperanton en Demokratia Kongo Respubliko, okazis en Kinŝaso la unua seminario organizita de DKEA kaj ILEI; ĝi havis grandan sukceson. Tial DKEA kaj ILEI decidis organizi novajn konferencon kaj seminarion.

La eventoj disvolviĝis en la konstruaĵoj de Paroko Saint Ignace de Loyola, Cité verte en Kinŝaso, sur la vojo Kinŝaso-Matadi.

La konferenco okazis sabaton 16-an de aprilo 2011.

La seminario/kursoj daŭris la sekvantan semajnon, de la 18-a ĝis la 23-a de aprilo.

### **La konferenco**

Multaj personoj, okdeko, ĉeestis la konferencon, kaj esperantistoj kaj ne-esperantistoj. Inter alie ĉeestis du reprezentantoj de la Ministerio pri Turismo kaj de la Polico. Ankaŭ partoprenis ĵurnalistoj de RTNC (la nacia konga televidstacio) kaj de aliaj medioj.

Post solenaj kantadoj de la *Konga Nacia Himno* kaj de *La Espero*, Jean-Pierre Lungikisa, prezidanto de DKEA, malfermis la konferencon kaj la seminarion; li parolis pri la historio de Esperanto movado en Demokratia Kongo Respubliko.

Sinjinorino Nelly Masemi, kasistino de DKEA kaj prezidantino de KEVA, Konga Esperanta Virina Asocio, prezentis tiun-ĉi asocion kaj ĝiajn agadojn.

Dum la konferenco, la muzikgrupo *Konga Espero* vivigis la etoson per esperantaj kantoj, el la KD-o *Kiu Lingvo*, kaj dancado. Ankaŭ infanoj prezentis scenetojn en Esperanto.

Alain Delmotte legis la bondeziran leteron de Stefan MacGill, prezidanto de ILEI, al la partoprenantoj de la konferenco. Li legis la esperantan tekston kaj samtempe tradukis ĝin franclingve.

La temo de la konferenco estis “L'Espéranto face à la communication et au développement culturel” (Esperanto rilate al komunikado kaj kultura disvolviĝo). Alain Delmotte prelegis pri la sub-temo “L'impact de l'espéranto dans le tourisme” (Influo de Esperanto en turismo) kaj Andrea Bertrand pri la alia sub-temo “L'Espéranto et la jeunesse” (Esperanto kaj junularo). La partoprenantoj atente sekvis ambaŭ prelegojn.

Poste venis tempo de debato inter la prelegantoj kaj la publiko.

### **La seminario**

La seminario konsistis el du kursoj, unu por komencantoj, gvidata de Andrea kun helpo de Viktor Lufimpu, kaj unu por progresantoj/instruistoj gvidata de Alain helpita de Jackson Mafuila.

#### *1. Kurso por komencantoj*

Andrea planis la tagajn temojn de la kurso laŭ la kurso “Cours de la langue internationale espéranto”<sup>3</sup> alsendita de Renato Corsetti. Sed, ĉar ŝi intencis paroligi la studentojn, ŝi ne sekvis la kursmetodon kaj insistis pri parola esprimado. Plie kelkajn partojn prezentis la progresantoj kiel

---

1 el Liono, Francio

2 el Loveno-la-Nova, Belgio

3 produktita de la Argetina Instituto de Esperanto, adaptita por Afriko kaj ĝisdatigita de Alain Delmotte

provlecionoj.

Baze de sia persona sperto, Andrea provis lernigi tion, kion malfacile ŝi komprenis, kiam ŝi eklernis sola la internacian lingvon, ofte uzante ekzemplojn de ĉiutaga vivo kaj ripetigante ofte samajn temojn. Ŝi uzis parolajn ekzercojn el la “Metodo 11”<sup>4</sup>, kiuj utilas por paroligi lernantojn kaj samtempe enkapigi bazajn frazfaradojn pro ripetado.

Dum la semajno, Andrea intruis komence france kaj poste iom post iom esperante, tiel trakondukante la lernantojn al uzo de esperanto. Je sabato matene, ŝi organizis sintezan ekzercon, kiu devigis la studentojn kompreni demandojn, fari ilin al najbaro kaj ricevi respondojn.

Je sabato posttagmeze, dum la disdonado de la atestiloj al la komencantoj, oni ankaŭ donis al ili presitajn ekzemplerojn de la kurso, kiujn Alain kaj Andrea kunportis en siaj valizoj. Ĝojege la komencantoj ricevis la libreton, per kiu ili povos daŭrigi la lernadon, minimume tion Andrea konsilis al ili.

Tamen la tasko de Andrea estis iom malfacila pro diversaj kialoj.

Unue la nombro de komencantoj estis tro granda, ĝi atingis 45, eĉ la policistoj, kiuj deĵoris dum la kurso, iĝis studentoj. Pro tiu nombro, estis malfacile paroligi la studentojn kaj kontroli la prononcadon kaj la lingvon.

Plie la grupo ne estis homogena, kiel ofte; estis veraj komencantoj, komencintoj kaj eĉ eternaj komencantoj. Pro la nombro de la grupo, estis malfacile kontroli tiujn du lastajn grupojn por ke ili lasu la komencantojn respondi kaj paroli.

Fine, estis alia grava problemo: la malsama nivelo de ĝenerala kulturo de la partoprenantoj genis la komprenadon de gramatikaĵojn, eĉ se tiujn Andrea evitis prezenti kaj instrui teorie.

## 2. Kurso por progresantoj/instruantoj-instruontoj

Partoprenis dek naŭ personoj; pliaj tri alvenis mardon la 19-an el Bas Congo, aparte el Matadi proksime de la oceano, la plej fora loko, de kie venis partoprenantoj. Pliaj aliĝis, sed ne povis atingi Kinŝason pro distanco kaj transporta kaj mona problemo.

Antaŭ la kurso, lundon 18-an, la partoprenantoj faris malgrandan teston por certigi ke ili havis sufiĉan nivelon por sekvi la kursojn. La testo esti laŭ la skriba parto de la nunaj KER ekzamenoj, nivelo B1. Ĉiuj, kiuj ĉeestis lunde matene (15), sukcesis, ĝenerale kun bonaj aŭ tre bonaj poentoj.

La kurso por progresantoj enhavis du flankojn: unu, matene, pri la lingvo kaj la alia posttagmeze pri instruado de Esperanto.

Pri la lingvo, post rememoro de la bazoj, oni elektis kelkajn tiklajn aspektojn: akuzativo (ĉiuj kazoj), korelativoj, prepozicioj, tempoj de la verboj kaj participoj, reflektivaj verboj, verbaj transitiveco, ligoj kaj -ig-/-iĝ-, vortfarado. Pri ĉiu temo, estis prezentado de la teorio kaj poste diskuto, apliko kaj ekzercoj.

La parto pri instruado estis bazita sur la libro “Manlibro pri Instruado de Esperanto”, de K. Kovats (red.), kadre de *Flugiloj de Malfacila Vento* projekto. Oni studis la diversajn metodojn por la instruado de E-o, la ŝtupojn dum leciono kaj traktado de temo, la malfacilaĵojn de la lingvo. Tiuj estis la teoria parto de la kurso. Ankoraŭ estis praktika parto; la partoprenantoj devis prepari lecionojn pri malgrandaj temoj kaj prezenti ilin al la grupo de komencantoj. Tiuj provlecionoj okazis merkredon, ĵaŭdon kaj vendredon. La sekvantan tagon oni analizis la provlecionojn por trovi korektendaĵojn kaj plibonigaĵojn.

Plie, antaŭ la konferenco kaj la seminario, la progresantoj ricevis kopion de la kurso “Gerda malaperis!” kaj dum la seminario, ĉiutage, ili devis plenumi la ekzercojn de kvin ĉapitroj de la libro. Tiuj estis senditaj al Renato Corsetti por korektado kaj estos la unua ŝtupo de la necesa laboro antaŭ

---

4 Metodo/Méthode 11, Espéranto, le monde au bout de la langue. Espéranto-France, Paris, 2001

trapasi la oficialan ekzamenon de instruisto <sup>5</sup>. Ĉiuj progresantoj diligente faris la taskojn.

## **Komentoj**

La kondiĉoj estas malfacilaj en Kongo por instrui.

Unue kiel ofte en Afriko, mankas mono kaj neniu organizo povas okazi sen ekstera helpo. En tiu ĉi kazo, helpo venis el Fondaĵo Hans (por la progresantoj), el ILEI kaj el kluboj kaj individuoj en Belgio kaj Francio. Sen tiuj helpoj, nek la konferenco, nek la seminario povus okazi. La organizantoj kaj la instruistoj multe dankas la subtenantoj pro tio.

Estas malfacile por la lokaj grupoj peti monon de iliaj grupanoj aŭ por partopreni tiajn okazintaĵojn aŭ eĉ por kotizi. Tamen, la estraro de DKEA intencas iom post iom atingi memstarecon.

Alia ekzemplo estas komunikado ene de la lando kaj kun eksterlandaj personoj aŭ instancoj. Estas preskaŭ nenie aliro al la reto kaj, kiam ekzistas, la kvalito estas tiel malbona ke oni perdas multe da tempo kaj mono. Ankaŭ la poŝtaj kostoj estas altaj por la lokaj personoj kaj poŝtofiĉejoj estas iom malmultaj.

Aliflanke, la fizikaj kondiĉoj ankaŭ estas ofte malfacilaj. La loko de la konferenco kaj seminario ne estis tute taŭga tiucele. Aparte estis malfacile havi aliron al komputilo kaj presado kaj fari fotokopiojn.

Malgraŭ tiuj malfacilaj kondiĉoj, estas granda entuziasmo por Esperanto kaj multaj agadoj okazas, grupoj kreiĝas, kursoj estas organizataj.

Tamen ni havis kelkajn malbonajn sentojn kaj ni sentis, ke kelkfoje estas interpersonaj konfliktoj, foje importitaj de ekstere. Tion ni multe bedaŭris.

Konklude, ni vidas veran grandan futuron por Esperanto en DR Kongo, aparte se oni daŭrigas kaj realigas la intencitajn agadojn, kiuj estis diskutitaj antaŭe kun respondeculoj (kiel la estraroj de UPN en Kinŝaso <sup>6</sup> kaj Universitato Kongo en Mbanza Ngungu).

---

<sup>5</sup> vidu <http://uea.org/vikio/Stud-Programo>

<sup>6</sup> vidu "Afrikaj perspektivoj: daŭrigo kaj nova komenco ILEI-seminario en Kinshasa, Radojica Petrovic. IPR 09/3, pp. 30-32